

# ĉu vi ŝatus kulti vin valora aktivulo en la nuntempa Esperantio? komencu ĉe **KULTURA CENTRO ESPERANTISTA**

**Leonardo Baroncelli**, itala diplomato, oficis en Kinšaso (Kongolando) kaj en Nov-Jorko ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li vivas en Toskanio.

*Geopolitiko estos la studobjekto kiun mi traktos dum la kurso por la Civitaj kadroj. Specife mi okupiĝos pri du temoj: la internaciaj organizaĵoj sur planeda skalo kaj Afriko. Por ili ambaŭ, kun la celo helpi al orientigo pri la nuntempo kaj al prognozo pri la perspektivoj.*

Louis Ferdinand (aŭ simple Lu **von Wunsch-Rolshoven** vivas en Berlino. Li gvidas la organizon EsperantoLand, heredinton de la fama E-Centro Paderborn.

*La komunikado estas esenca elemento de la socio. De trafa komunikado dependas la bildo kiun la aliaj havas pri ni mem.*

Kian Esperantion ni kapablas transdoni al la ekstera publiko? Kiel informi pri ĝi nuntempe? Kian rolon efektive ludas la novaj teknologioj? Kaj precipe, kiu modelo de Esperanto plej taŭgas por komunikado?

**Giorgio Silfer**, doktoro pri modernaj lingvoj kaj beletristiko, estas unu el la protagonistoj en la projekto de la Esperanta Civito. Li karieris kiel parlamenta atașeo kaj kabinetestro en regiona ministerio, paralele al spertoj kiel docento, ankaŭ universitata. Li rezidas en Svislando.

*Lerni parlamentan teknikon estas esence por aktivulo en Esperantio, kies socia realaĵo fundamentas en la asembleaj kaj kongresaj strukturoj. Tian bezonon havas la aktivuloj de ĉiuj neregistaraj organizaĵoj: ofte mi miras pro la manko de preparo en demokratia proceduro ankaŭ ĉe kleruloj. Grava indikatoro pri la sano de demokratio ja estu, ke aktivi en ties gvidaj institucioj helpas maturigi.*

La kurso okazos de la 23<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> de julio 2017 en salono Claude Piron de la Esperanto-Domo. Ne pli ol 15 personoj estos akceptitaj.



**Esperanto-Domo**

**strato Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds  
telefono (41) 32 9267407 <[kce@esperantio.net](mailto:kce@esperantio.net)>  
la formado okazos 23-28 julio 2017**